

LA FEMINA MANIFESTO DE PEN INTERNACIA

La unua kaj fundamenta principo de la Ĉarto de PEN asertas ke “literaturo ne konas landlimojn”. Tiuj landlimoj estis tradicie konceptitaj kiel muroj inter landoj kaj popoloj. Por multaj virinoj en la mondo – kaj por preskaŭ ĉiu virino, almenaŭ ĝis antaŭ nelonge – la unua, lasta kaj probable plej potenca landlimo estas la pordo de la domo en kiu ŝi vivas: la hejmo de la gepatroj aŭ de la edzo. Por ke la virinoj havu la rajton paroli libere, la rajton legi, la rajton verki, necesas ke ili havu la rajton moviĝi fizike, socie kaj intelekte. Ekzistas malmultaj sociaj sistemoj kiuj ne rigardas malamike virinon kiu moviĝas sendepende.

PEN kredas ke violento kontraŭ virinoj, en ĉiuj siaj multaj formoj, inter la hejmaj muroj aŭ en publika sfero, kreas danĝerajn formojn de cenzuro. Tra la tuta mondo kulturo, religio kaj tradicio estas daŭre taksataj superaj al homaj rajtoj kaj estas uzataj kiel argumentoj por kuraĝigi aŭ defendi agresojn kontraŭ virinoj kaj knabinoj.

PEN kredas ke silentigi personon signifas negi ĝian ekziston. Estas iu tipo de mortigo. Sen la plena kaj libera esprimiĝo de la virina kreivo la homaro perdas elementojn absolute necesajn.

PEN SUBTENAS LA SEKVAJN INTERNACIE AGNOSKITAJN PRINCIPOJN:

1. NEPERFORTO: Ĉesu perforto kontraŭ virinoj kaj knabinoj en ĉia formo, inkluzive juran, fizikan, seksan, psikologian, parolan kaj diĝitan; estu stimolata la kreo de medio en kiu virinoj kaj knabinoj povu esprimiĝi libere, kun garantio ke ĉiu genre bazita violento estu enketita kaj punita, kaj estu kompenso por la viktimoj.

2. SEKURECO: Protekti verkistinojn kaj ĵurnalistinojn kaj batali kontraŭ la senpuneco post violentaj agoj kaj persekutado faritaj al ili, en la konkreta mondo kaj en interreto.

3. EDUKADO: Elimini genran malekvilibron en ĉiu eduknivelo, propulsante plenan aliron de virinoj kaj knabinoj al kvalita edukado kaj certigante ke la virinoj povu komplete ĝui sian rajton legi kaj skribi.

4. EGALECO: Garantii por virinoj rajtegalecon kun la viroj antaŭ la leĝo; kondamni la diskriminaciojn kontraŭ virinoj en ĉia formo kaj entrepreni ĉiun necesan paŝon por elimini diskriminaciojn kaj garantii la plenan egalecon de ĉiu homo tra la disvolvo kaj progresado de la verkistinoj.

5. ALIRO: Garantii ke la virinoj ricevu la saman aliron al la tuta gamo de civilaj, politikaj, ekonomiaj, sociaj kaj kulturaj rajtoj, por ebligi la plenan kaj liberan partoprenon kaj publikan agnoskon de la virino en ĉiu komunikilo kaj tra la spektro de la literaturaj ĝenroj. Krome, certigi al virinoj kaj knabinoj egalecan aliron al ĉia formo de komunikado kiel ilo de esprimlibero.

6. EKVIVALENTECO: Subteni la egalan ekonomian partoprenon de la verkistinoj kaj garantii ke verkistinoj kaj ĵurnalistinoj estu dungitaj kaj pagataj samkiel la viroj, sen ajna diskriminacio.